

ESPERANTO?
JEN PREZENTO!

ESPERANTO


1887

La unua libro aperas.

Li inventis la lingvon. Li estas L. L. Zamenhof
(1859-1917)



Flago



Temas unue pri revolucio.

Poste okazas natura evoluo.

Lingvo planita laŭ SISTEMO!

Substantivoj finiĝas per **-o**

Adjektivoj finiĝas per **-a**

Adverboj finiĝas per **-e**

Infinitivoj finiĝas per **-i**

Por lerni tiun lingvon, vi povas
DEDUKTI!

Se vi scipovas
« ĉiam » kaj « neniam »,
vi kapablas dedukti kaj trovi
jenon: « ĉio » kaj « nenio »,
« ĉie » kaj « nenie ».

Uzante la vorton, radikon

kant-

eblas fari:

- Mi kantas
- Kanto, kantoj
- Kantisto
- Kantado
- Kantaro
- Kantema

Neniu malregula verbo!

- Mi amas mi amis mi amos
- Vi amas
- Li amas
- Ŝi amas
- Ni amas
- Vi amas
- Ili amas

- Kondicionalo, samtempeco, ordono...
Ĉio esprimiĝas per ESPERANTO!

VASTA LITERATURO

originala kaj tradukita

Jen ekzemplo: Japanio

KAWABATA Yasunari (Nobel premiito):

- YUKI GUNI (jp)
- PAYS DE NEIGE (fr)
- NEĜA LANDO (eo)


Libro



Jen tio el la japana kulturo, kiu transiris
al esperanto.



Antologio de la japana literaturo en esperanto.



De HORI Yasuo: aperas po unu libro jare.

Ekde la 11a de marto 2011: po unu raporto tage



SAME

por Islando

Ĉilio

Albanio

....

Esperanto

- 3-5 milionoj da parolantoj en pli ol 125 landoj
- 70 landaj asocioj grupigitaj en UEA
- Movado, monda centro en Rotterdam (NL)
- Renkontiĝoj, kongresoj, staĝoj, kolokvoj....
- Radioelsendoj, televido, forumoj, la Reto....
- Reto de personoj gastigemaj (*Pasporta Servo*).
- Fakaj asocioj (> 50)
- 185 000 artikoloj ĉe wikipedia (en okt. 2013)

Oficialaj agnoskoj

- 1923: Universala Poŝta Unio
- 1954: UNESCO-rezolucio
- 1967: ISO elektas 2 literojn « eo » por Esperanto
- 1985: UNESCO-rezolucio
- 1993: « International PEN club » akceptas la klubon « Esperanto PEN klubo »
- 2006: Akreditigo kadre de Eŭropa Lingva Referenckadro de Konsilio de Eŭropo.
- 2012: Google tradukas el Eo kaj al Eo
- UEA = NRO agnoskita de UN kaj de UNESCO
- UEA = establo en kunlaboro kun ISO (TC37)

Parto de Eŭropa Unio havas
saman valuton: EURO.

La mondo bezonas *komunan*
lingvon:
ESPERANTO

interkultura vektoro, kiu respektas la lokajn lingvojn.

15 12 2009

150 jaroj

15an de decembro 1859: naskiĝo de la kreinto Zamenhof



Esperanto

Justa lingvo
Lingvo de paco

Ĝi apartenas al ĉiuj.
Ĝi apartenas al neniu.

Ĝi ne havas pezan pasintecon,
same kiel la koloniaj lingvoj havas.